

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 1 2021

Vendredon la 2an de julio

69a jaro

Kunvenoj en Esperantonia

En junio ni rekomencis aranĝi ĉeestajn klubkunvenojn, post la pandemia malpermeso.

Mardon la 1an ni daŭrigis nian studadon laŭ la libro *Vibraĵ momentoj*.

Lundon la 21an pri la virtuala landa kongreso raportis tri partoprenintaj membroj.

En julio kaj aŭgusto ni ne aranĝos kunvenojn, krom se venos eksterlandaj gastoj.

Koncizan raporton pri la jarkunveno ni dissendis per retpoŝto la 6an de marto.

Novaj seĝoj.

Preterpasantoj vidis tra nia fenestro niajn *sviktstol*-seĝojn kaj ege ŝatis ilin. Ili aĉetis la ok kiuj staris ĉirkaŭ la granda tablo, por 12 000 kr. Aldone ili donacis al ni ok pli komfortajn seĝojn, kun brakoj kaj molaj sidplato kaj dorso. Suma rezulto tre favora por ni!

Malnovaj libroj

Pliaj libroj de Pepita. Ni ricevis du skatolojn kun libroj kaj kajeroj postlasitaj de Pepita de Caspary, multjara kluba prezidinto. Multaj malnovaj kajeroj, precipe kantaroj (nur tekstoj), sed ankaŭ binditaj libroj, inkl. *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) kaj *Esperanta Bildvortaro*.

Tio estas grandparte libroj kiujn ni jam havas en nia biblioteko, do vi volonte havigos la kromajn al malriĉaj grupoj, ekz-e en Afriko.

Aliĝu senpage al la VK!

Ni atentigas ke ĝis la venonta dimanĉo (postmorgaŭ, la 4a de julio)

vi povas aliĝi al la virtuala universala kongreso 17a–24a de julio

– se vi estas individua (rekta) membro de UEA ĉi-jare.

Interrete ĉe vk.esperanto.net .

Tie vi povas ankaŭ membriĝi.

Vidu cetere la novan (3an) numeron de *Norvega Esperantisto*, p. 6, malsupre.

Ĝuu la someron!

Klubo Esperantista en Oslo.

Esperantonia, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo, Tlf. 22 35 08 94. <oficejo@esperanto.no>.

Libroservo. Konto 0532 36 19699.

Sed kotizojn/ *kontingenter* pagu al NEL / *Forbundet* 0533 05 22870 .